

# Eŭropa Bulteno

---

Februaro 2019, Numero 189

---

## GRAVA SUKCESO POR ESPERANTO EN KROATIO



La 11-an de februaro Ministerio por Kulturo de Respubliko Kroatio (Administra ofico por protekto de kulturheredaĵo) dissendis al 21 adresoj SKRIBAN DECIDON de la Ministerio pri tio ke la TRADICIO DE ESPERANTO havas en Kroatio karakteron de nemateria kultura fenomeno kaj enskribis ĝin en Registron de kroata kulturheredaĵo. La decido estis sendita al 19 Esperanto-organizaĵoj en Kroatio kaj al Instituto de etnologio kaj Instituto por kroata lingvo.

La oficialan peton al la Ministerio sendis en la jaro 2015 Kroata Esperanto-Ligo kun 18 societoj kaj subteno de la prezidanto de EEU, Sean O Riain. La peto troviĝis sur speciala formularo kiun devas plenigi ĉiu petanto kaj kun kromaj aldonoj kaj klarigoj. En ĝi estis detala priskribo de E-movado en Kroatio dum la tuta historio ekde 1891. La decidon pri la peto akceptis estraro de Kroata Esperanto-Ligo kaj taskigis la sekretariinon Spomenka Štimec pretigi la materialon. Pri la sukcesa procedo kaj fina sukceso de la peto ĉefe estas merita Spomenka, kiu sian taskon plenumis plej eble konvene. Ŝi kolektis la tutan materialon kaj



pretigis la peton. Mi poste iom kompletigis tiun materialon kaj helpis trovi fotan kaj video-materialon per kiu ni antaŭ ĉio montris la evoluon de la E-kulturo kaj ekziston de denaskuloj, kiuj edukiĝis en Kroatio en Esperanto-Kulturo. Post la forsendo, Spomenka esploris daŭre ĉu troviĝas iu el Esperantistoj en la kulturministerio aŭ Kroatia UNESKO-komisiono por subteni la peton. Ŝi trovis kelkajn esperantistojn kaj ili ankaŭ iom helpis. Unu el ili ankaŭ estis membro de la Komisiono por kultura heredaĵo, kiu sendube pledis dum la kunsidoj por akcepti pozitivan decidon. Fine, post la decido li mem ricevis la taskon formuli la klarigon de la decido.

Tiu ĉi atingo estas eksterordinara atingiĝo por Esperanto ĝenerale, ĉar ĝi estas la dua oficiala ŝtata agnosko de Esperanto post Pollando. Ĉi tiun oni povas konsideri kiel agnosko de ŝtato Kroatio ke Esperanto estas unu el ĝiaj aŭtoktonaj lingvoj, kaj tio estas gravega argumento por ĉiuj kiuj kontraŭas Esperanton asertante ke ĝi ne estas aŭtoktona eŭropa lingvo.

EEU ricevas nun seriozan argumenton por stimuli la procezon ke kelkaj pliaj eŭropaj landoj atingu la samon. Tiam eblos prezenti novan planon por Esperanto en EU per kiu oni provos akiri staton por Esperanto de agnoskita eŭropa lingvo.

Kio estas kondiĉoj por tion atingi kaj kiel esperantistoj en Kroatio tion realigis?

Oni devas havi kontinuan aktivadon de la Movado dum longa periodo. Kroataj esperantistoj povis pruvi ke ili daŭre aktivas kaj kreas sur kultura kampo, parte riĉigante la internacian E-kulturon kaj parte perante kroatan kulturon per Esperanto al esperantistoj de la mondo kaj al aliaj kulturoj per retradukoj. Esperantujo havis kaj plu havas iom da profesiuloj en sia movado kaj tio ebligas ke pri la Movado daŭre oni aŭdas iom en la ĝenerala publiko. Tiu tre aktiva agado, aparte la kontinua aktivado de Studenta E-Klubo en Zagrebo kiu naskadis daŭre novajn intelektulojn kun kono de Esperanto kontribuas al relativa konateco de Esperanto en la lando. Tial montriĝis ke nuntempe troviĝas en preskaŭ ĉiuj ŝtataj instancoj almenaŭ iu esperantisto aŭ amiko de Esperanto.

La procedo kiel atingi tian rezulton estas ligita al ekzisto de profesia sekretario de Kroata E-Ligo kiu povis dediĉi necesan labortempon por prepari materialojn, kontakti instancojn, informadi kaj korekti eventualajn erarojn. Tio povas esti ekzemplo por aliaj landoj, kiuj havas similajn kondiĉojn.

Laŭ mi en Eŭropo sendube ekzistas almenaŭ deko da landoj kiuj povas pruvi la samon kion pruvis Kroatio: ke la landoj havas pli ol 100-jaran E-agadon kaj kultrurkreadon kaj ke Esperanto en ili estas uzata kiel unu el landaj lingvoj samsence kiel la roma kaj aliaj minoritataj lingvoj. Tiu esperantista kulturkomunaĵo kreis pli da kulturfaktoj ol plimulto da malgrandaj minoritatoj. Kaj same kiel en ĉiu lando oni konsideras verkistojn kiuj verkis mezepoke en la latina kiel sialandaj verkistoj, tiel same oni devas konsideri E-verkistojn en sia lando kiel sialandajn verkistojn.

La originala dokumento pri la agnosko, kies E-tradukon ni aperigas ĉi-sube, estas ĉe la paĝaro de Kroata E-Ligo [http://www.esperanto.hr/agado\\_nemateria\\_rh.htm](http://www.esperanto.hr/agado_nemateria_rh.htm)

Zlatko Tišljarić



## RESPUBLIKO KROATIO

Ministerio de Kulturo  
Administra oficejo por protekto de kulturheredaĵo

KLASNUMERO: UP II-612-081 1 8-06/0150  
UR-Numero: 532-04-0 1 -03-02 12-19 -2  
Zagreb, la 11-an de februaro 2019

Ministerio de Kulturo baze de la artikolo 12, parto 1 de la Leĝo pri protekto de kulturfenomenoj („Narodne novine”, numero 69199, 151/03, 15'1103, 87/09, 88/10, 61111, 25112, 136112, 157113, 152114, 44117, 90/18) kaj artikolo 20, partoj 1 kaj 2 de la Regularo pri formo, enhavo kaj maniero

gvidi Registron de kulturfenomenoj de Respubliko Kroatio („Narodne novine”, numero 69199, 151/03, 15'1103, 87/09, 88/10, 61111, 25112, 136112, 157113, 152114, 44117, 90/18), akceptas

## SKRIBAN DECIDON

1.

Oni konstatas ke la TRADICIO DE ESPERANTO en Kroatio havas karakteron de nemateria kultura fenomeno sence de la artikolo 8, parto 1, alineo 1e de la Leĝo pri protekto kaj konservo de kulturaj fenomenoj.

2.

Kiel kulturfenomeno el punkto 1. de ĉi tiu Decido estas starigita jena sistemo de protekto:

- oni devas certigi atingeblojn de la kulturfenomeno por la ĝenerala publiko,
- instigi kunlaboron de unuopuloj, grupoj kaj la komunaj kiu heredigas la fenomenon rilate identigon, difinon, plu kreadon kaj transdonon de la heredaĵo,
- Popularigi kaj diskonigi la kulturfenomenon per okazigo de ekspozicioj, fakaj renkontiĝoj per elektronikaj medioj, aŭd- kaj vid- dokumentado kaj alimaniere,
- instigi transdonon kaj flegadon de la kulturfenomeno
  - instrui necesan fakan personaron por transporto de la scio per seminarioj kaj laborejoj de formala kaj neformala instruado,
  - daŭrigi la esploron de la kulturheredaĵo, per adekvata dokumentado en ĉiuj formoj kaj manieroj de moderna printado kaj per faka kaj scienca valorigado,
  - diskonigi la funkcion de la kulturfenomeno en la socio kaj enplekti la protekton de la fenomeno en planitajn evoluprogramojn,
  - interesigi la publikon kaj protekti la fenomenon konsiderante la procezojn de tutmondigo kaj de sociaj transformiĝoj por eviti danĝeron ke la fenomeno malaperu, estu detruata aŭ disvendata
- La portantoj de la kulturheredaĵo estas taskigitaj protekti la fenomenon.

3.

La portantoj estas ĉiuj juraj kaj fizikaj personoj, notitaj sur la listo de la portantoj, kiu estas konsista parto de ĉi tiu Decido. Pri ĉiuj ŝanĝoj rilate la portantojn, la decidpova organo devas informi Fakan Komisionon por akcepto de la kulturfenomenoj kiu harmonie kun la postulo ŝanĝos la liston de la portantoj.

4.

Al la dirita kulturfenomeno el punkto I. de la citita Decido oni aplikas Leĝon pri protekto kaj konservo de kulturfenomenoj kaj ĉiujn regularojn kiuj rilatas al kulturaj fenomenoj.

5.

La prilaborita kulturfenomeno estos enskribita en la Registro de kulturfenomenoj de Respubliko Kroatio sur la listo de protektitaj kulturfenomenoj sub la numero Z – 7298

6.

Eventuala plendo ne prokrastas efektivigon de ĉi tiu Decido.

### **Klarigo pri la decido**

Internacia lingvo Esperanto estas planlingvo, kiun iniciatis Ludvig Lejzer Zamenhof kaj prezentis ĝin al la publiko en publikaĵo en la rusa lingvo presita en 1987 en Varsovio sub la titolo Internacia Lingvo „Mednarodni jezik“. Samjare aperis eldonoj en la franca, pola kaj germana lingvoj. La publikigo de tiu ĉi planlingva projekto koincidas kun la pli vasta historia kunteksto pri lingva kreado en la dua duono de la 19a jarcento kiam al la publiko prezentiĝis kelkdeko de intencilingvaj projektoj kiel rimedo de nacie neŭtrala lingva komunikado. Kiel lingvo kun simpla gramatiko sen esceptoj kiujn havas amase etnaj lingvioj, kun vortoj bazitaj je eŭropa internacia leksiko kaj latinismoj (ĉirkaŭ 70%) kaj malpli je ĝermanismoj (20%) kaj el aliaj lingvoj, Esperanto supervivis ĉiujn siajn historiajn rivalojn kaj estas ankaŭ nuntempe uzata kiel alternativa rimedo de internacia komunikado. Aparte ĝia graveco estis kaj estas ankaŭ nuntempe por la tiel nomataj malgrandaj popoloj kiuj per tiu ĉi lingvo havis kaj havas eblecon prezenti siajn kulturojn al la mondo kaj per ĝi mem konatiĝi pri la samspecaj atingoj de aliaj popoloj. La kroata kultura kaj scienca publiko el la komenco de Esperanto estis fundamente informita pri la planlingva situacio fine de la okdekaj jaroj, ĉar la fama kroata filologo Tomo Maretić dum la solena kunveno de la Jugoslavia Scienca Akademio en Zagrebo en 1891 dediĉis sian prelegon ĝuste al strukture kompara analizo de tiutempaj planlingvoj kritike tuŝante ankaŭ Esperanton. Tiam la esperantista movado, kiu sian disfloradon havos en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento kaj dum la tempo antaŭ la 1-a mondmilito troviĝis nur en la komenco mem kaj inter unuaj esperantistoj estis jam kelkaj unuopuloj el la teritorio de la nuna Kroatio. Organizitaj formoj de la Esperantista Movado aperas en la jaroj 1907, 1908 kaj en komenco de 1909, kiam en Zagrebo estis fondita Societo de Kroataj Esperantistoj, kiujn gvidis leksikografo, ĵurnalisto, antologiisto kaj tradukisto Mavro Špicer kaj instruistino Danica Bedeković, pl. Pobjednički.

Ili mem verkis unuajn kroatajn lernolibrojn de Esperanto kaj redaktis la revuon Kroata Esperantisto kies unua numero aperis en 1909 kaj sur kies titolpaĝo estis traduko de la poemo de Petar Preradović Mia Barko. Estis du deklarataj celoj de la menciita revuo: unuflanke ĝi devus disvastigi Esperanton en Kroatio kaj aliflanke ĝi devus nian riĉan sed nemulte konatan literaturon enkonduki en Esperanton, en misteran landon, kiu troviĝas nek sur la Luno, nek en la Kosmo sed en koroj de ĉiuj esperantistoj kaj en iliaj animoj. Jam en 1912 aperas antologio de kroata poezio en esperanta traduko de Mavro Špicer. Dum la tuta historio de esperantismo en diversaj socipolitikaj ŝtatsistemoj en kiuj Kroatio estis ĝis la nunaj tagoj, kroataj esperantistoj daŭrigis kontinue aktivi antaŭenigante kroatan literaturon kaj kulturon en la mondo kaj en tio ofte esperantaj tradukoj de verkoj el kroata literaturo servis kiel bazo por traduko al neeŭropaj lingvoj kiel la ĉina, hinda kaj farsa. La plej nova ekzemplo de la diskonigado de kroata literaturo en Esperanto estas traduko de la konata plurfoje premiata romano Nigra Patrino de la Tero de Kristian Novak aperinta en 2017).

La tradukon efektivigis kroata esperantisto kaj publikigisto Josip Pleadin. Kroataj esperantistoj donas escepte aktivan, organizitan, sciencan, artan kaj kulturan kontribuon al tutmonda esperantista komunumo, kiu intertempe evoluigis aŭtentikan kolektivajn kulturon kaj identecon kun specifaj komunikaj praktikoj kaj paradigmoj, kun organiza strukturo kaj kulturaj fenomenoj kaj formuloj. Plue kroataj esperantistoj riĉigas la kroatan kulturmedion per sia aktivado kaj kontaktoj kun alilandaj esperantistoj organizante diversajn kongresojn studaranĝojn kaj kulturajn manifestaĵojn en kiuj kunpartoprenas esperantistoj el diversaj landoj, kiuj transportas al kroata medio per Esperanto kulturajn kaj artajn atingiĝojn de siaj popoloj.

Rememorante gravan rolon de Esperanto kiel rimedo por diskonigo de kroata kulturo en la mondo dum 100 jaroj de la E-movado en Kroatio okazis en Zagrebo en novembro 2008 en la Filozofia Fakultato de la Zagreba Universitato internacia scienca simpozio sub la titolo Esperanto kaj Kroata Kulturidenteco, en kiu partoprenis trideko da prelegantoj. Samkiel la prizorgo de lokaj idiomoj je nacia nivelo rekte kontribuas al prizorgo de tutmonda lingva diverseco kiel valoro per si mem pro la minaco ke pro la formorto de idiomoj kaj lingvoj kun malgranda nombro de parolantoj (ĉ. 5000) malaperu aŭtoktonaj kaj neripetebaj pensesprimaj specimenoj kiuj kreas spirit-kulturan heredaĵon de la homaro, same la prizorgo kaj defendo de la internacia lingvo Esperanto kiel tutmonda kulturlingva heredaĵo de la homaro gravas ankaŭ sur naciaj niveloj, ĉar tio ebligas al malgrandaj popoloj kiel la kroata siajn kulturatingojn per ĉi tiu nacie neŭtrala rimedo de internacia komunikado prezenti al la monda esperantista publiko. La esperantista komunumo (ĉiuj parolantoj de Esperanto en Kroatio ĉu kiel individuoj ĉu unuigitaj en societoj aŭ neformalaj grupoj) evidentiĝas en forta esprimo de komuna solidareco kaj socia kohezio same kiel ĉe ĉiuj komunumoj.

La rolo de Esperanto kiel lingvo peranto por disvastigo de kroata kultura kaj arta kaj aparte de literatura heredaĵo kaj moderna literatura produktado estas argumento por enskribi ĉi tiun lingvon kiel nemateria atingiĝo en Registron por nemateria kultura heredaĵo de la Ministerio de Respubliko Kroatio. Komisiono por nemateria kultura heredaĵo de la Ministerio de Kulturo dum sia kunsido okazinta la 29-an de majo 2017 taksis ke la tradicio de Esperanto en Kroatio havas karakteron de nemateria kultura fenomeno laŭ la difino de la Leĝo pri Konservado de Kultura Heredaĵo en la paragrafo 9, parto 1, alineo 1. Baze de transdonita dokumentaro kaj prezentitaj faktoj, kaj pro la rekomendo de la Komisiono por nemateria kultura heredaĵo, Faka Komisiono por konstato de la karakterizoj de kultura fenomeno, dum sia kunsido okazinta la 18-an kaj 19-an de decembro 2018 konstatis ke la tradicio de esperanto en Kroatio havas karakteron de kultura fenomeno. Akceptante ĉi tiun skriban decidon harmonie kun la artikolo 12, parto I de la Leĝo pri konservado de kulturaj heredaĵoj estas aplikataj je Esperanto laŭ la citita Leĝo kaj aliaj preskriboj kiuj rilatas al kulturaj fenomenoj.

Harmonie kun la artikolo 12, de la parto 4 de la sama Leĝo per punkto 5 de la ekspliko de tiu ĉi skriba decido estas difinita la devo enskribi la prideciditan fenomenon en Registron de kulturaj fenomenoj de Respubliko Kroatio en la Liston de konservataj kulturaj heredaĵoj harmonie kun la artikolo 12, parto 5 de la Leĝo pri konservado kaj defendo de kulturaj fenomenoj. La plendo kontraŭ ĉi tiu skriba decido ne prokrastas ties efektiviĝon pro la supre esprimitaj kaŭzoj, deciditaj kiel en la ekspliko.

### **Instrukcio pri jura procedo.**

Kontraŭ tiu ĉi decido oni povas plendi al la Komisiono pri plendoj de la Ministerio de Kulturo en la tempolimo de 15 tagoj ekde ties akcepto. La plendo estas transdonata al tiu ĉi organo

senpere aŭ oni sendas ĝin per poŝto rekomendite kaj oni povas ankaŭ deklari ĝin antaŭ la Protokolo. Al la plendo harmonie kun la Leĝo, artikolo 9, parto 2, punkto 29 de la Leĝo pri administraj pagoj, oni ne pagas administrajn kostojn („Narodne novine“ numero 115/16).

Helpanto de la Ministrino  
Davor Trupković, dipl.inĝ. arĥ.

## **PUBLIKIGITA RAPORTO PRI LA PUBLIKA KONSULTADO “PLURLINGVECO EN EŬROPAJ INSTITUCIOJ” DE EŬROPA OMBUDSMANO**

Mi, kiel ĉiuj la partoprenintoj en la publika konsultado pri Plurlingveco en EU ricevis, je la 21<sup>a</sup> de februaro 2019, elektronikan mesaĝon de [EO@ombudsman.europa.eu](mailto:EO@ombudsman.europa.eu) kun la fina Raporto pri la rezultoj de la konsultado.

En la paĝo de la E.O. (Eŭropa Ombudsmano), <https://www.ombudsman.europa.eu/it/correspondence/it/110044>, oni povas elekti tradukon de la Raporto en 24 lingvoj kaj legi ĝin. Mi devas konfesi ke estas por mi speco de plezuro malfermi la Raporton en la aliaj lingvoj kaj eltrovi kie ili raportas pri nia lingvo! Mi invitas la legantojn viziti la paĝon pri la Raporto. Jen kelkaj miaj notoj. Dum julio 2018, la E.O. envojigis publikan konsultadon, pri kiu oni povas legi ĉi tie: <https://www.ombudsman.europa.eu/it/public-consultation/it/99005>; la demandaro, kiu rilatas al la uzado de la lingvoj en eŭropaj institucioj, oficoj kaj agentejoj, estas laŭ mi tre interesa, ankaŭ ĉar ĝi enhavas multajn resendojn al eŭropaj leĝoj pri lingvoj. La datlimo por la respondoj estis la 30a de septembro 2018.

La E.O. ricevis nur 286 respondojn kaj interesa parto de ili alvenis de esperantistoj aŭ de esperantaj organizoj. Ankoraŭ unu fojo, EU devas agnoski ke Esperanto pluvivas! Fakte, pri la proponitaj modeloj de lingvopolitiko, sur paĝoj 4 kaj 5, alvenis 166 respondoj:

- 102 respondoj kiuj petas "limigitan plurlingvecon", kun tri – kvin oficialaj lingvoj ĉiam uzataj, kaj aliaj oficialaj lingvoj kelkfoje uzataj laŭ fiksitaj kriterioj;
- 18 deziras la "senliman plurlingvecon", kun ĉiuj oficialajn lingvoj tuj kaj samtempe je dispono;
- 46 deziras komunan lingvon parolatan de ĉiuj eŭropanoj; nur kvar el ili volas anglan lingvon kiel ideala lingvo kaj 41 "*estas forte dezirantaj la uzadon de komuna lingvo sed neŭtrala, kiel esperanto*", nome la 25% de la respondoj. Komprenoble, tio estas logika rezulto ĉar la esperantistoj estis tre interesitaj al ĉi tia speco de publika demandaro, multe pli ol la aliaj eŭropanoj.

Do, logike mi notas ankaŭ la jenajn punktojn de la Raporto:

- sur paĝo 7, pri la traduk-kostoj, la Raporto rimarkigas ĉi tian respondon: "uzado de unu komuna lingvo por malpliigi traduk-kostojn";
- sur paĝo 8, pri la interretaj paĝoj de EU: "Alia grupo de respondoj deziras ke ĉiuj interretaj paĝoj estus en unu komuna kaj neŭtrala lingvo";
- sur paĝo 12, pri eventŭalaj plibonigoj de la nura specifa eŭropa leĝo pri lingvoj, la Regularo n. 1/1958, 34 respondis ke ne deziras ĝisdatigojn de tiu leĝo kaj inter la 126 kiuj deziras kelkajn plibonigojn, grupo deziris "enkondukon de komuna kaj neŭtrala lingvo".

Interesa laŭ mi estas, je paĝo 15 de la Raporto, ke kelkaj respondintoj observis ke "sekve de Briteliro en marto 2019, la angla lingvo iĝu malpli domina kaj malpli grava en la interna kaj ekstera komunikado de la publika funkcio de EU".

Finfine, en la lastaj paĝoj de la Raporto estas kelkaj informoj pri la respondintoj, aparte interesaj por ni esperantistoj. Pri tio, inter la organizoj kaj la akademianoj, mi notis:

- esperantistojn, kiel ekzemple Federico Gobbo, Michele Gazzola, Daniel Gonçalves, François Grin, Christoph Knabe, Robert Phillipson, kiujn mi forte dankas;
- almenaŭ unu kontraŭ-esperantiston, kiel Angelo Auriemma;
- Jean-Claude Barbier, kiu estas kontraŭ la angla lingvo kiel vehikla lingvo de Eŭropo (vidu ekz. artikolo [https://www.cairn-int.info/abstract-E\\_HERM\\_075\\_0111--the-harm-english-as-a%20vehicular-language.htm](https://www.cairn-int.info/abstract-E_HERM_075_0111--the-harm-english-as-a%20vehicular-language.htm));
- la ĉeesto de la Universitato "Rovira i Virgili" (Rovira i Virgili estis konata apoganto de Esperanto dum la jaroj '20 en Hispanujo), Tarragona;
- inter la respondintoj, Victor Ginsburgh, kunaŭtoro, inter alie, de la interesa artikolo pri la problemoj de la angla lingvo sekve de Brit-eliro (vidu "*The Fate of English in the EU After Brexit: Expected and Unexpected Twists*", esperante "La sorto de la angla en Eŭropo poste la Brit-eliro: atendataj kaj ne atendataj tordiĝoj" en la paĝaro de "*Naked Capitalism*", esp. "Nuda Kapitalismo", <https://www.nakedcapitalism.com/2018/08/fate-english-eu-brexit-expected-unexpected-twists.html> - bedaŭrinde ĉiuj komentoj estas plene favoraj al la angla lingvo). Mi plene konfidas ke en la estontaj publikaj eŭropaj demandoj la respondoj favore al la internacia lingvo Esperanto estos pli multnombraj kaj efikaj ĉar ni certe komprenos ke tiaj estas bonaj okazoj por elmontri ke ni daŭre ekzistas.

Enrico Gaetano Borrello

## KLARIGO DE LA OFICO DE OMBUDSMANO

Ankaŭ mi kiel partopreninto ricevis atentigon de la Ombudsmano pri la apero de la informo, kaj do miavice demandis al ties skipo kio sekvos post ĉi tiu enketo. Jen la respondo ricevita (en la hispana):

Estimara sinjoro Barrio,

La informo pri la publika konsultiĝo estas nur resumo de la respondoj ricevitaj de la Popoldefendanto. La opinioj de la informo ne respegulas la sintenon de la Popoldefendanto. Momente la Popoldefendanto ne formulis rekomendojn bazitajn sur la respondoj, kaj ankoraŭ ne decidis ĉu ŝi faros sekvadon de la informo de la konsultiĝo.

Mi esperas ke tio ĉi respondas viajn demandojn.

Tonio del Barrio

## RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2018

### Ekstera Agado

La Platformo por multlingveco plu ekzistis en 2018 kaj en ĝi plu estas EEU kaj E@I kun kune 4 membroj, sed ĝi ne aktivis krom ke ĝi okazigis nur sian jarkonferencon en kiu partoprenis neniu el EEU, ĉar ne estas io farenda kaj ŝancodona, sed ni devus mem kovri la kostojn. Tio bedaŭrinde montras ke EU ne efektive opinias la multlingvecon grava celo – ŝajne ke la gvidantaro kredas ke la unulingveco jam superregis.

En 2018 EEU ne ricevis financojn por iu ajn nova projekto financata de EU. En februaro 2018 finiĝis la projekto „Rakontoj de rememoro“, kiu estis financita de la eŭropa programo Eŭropo por civitanoj. Pro tio EEU post aprobo de la fina raporto far EACEA, krom la kotizoj de membroorganizoj, en 2018 ricevis ankaŭ la finan pagon por tiu projekto. Tamen EEU daŭre kiel asociita partnero, kiu ne ricevas monon por sia laboro, partoprenas gravan projekton kiu estas realigata en 2018 kaj 2019, Multlingva Akcelilo. Tiun projekton EEU plene subtenas kaj en ĝi aktivas la sekretario kaj la prezidanto de EEU. La aktivado ene de tiu projekto en 2018 estis tre sukcesa kaj tial nia plano por 2019 grandparte ligiĝas al la projekto Multlingva Akcelilo, kiu promesas gravajn ŝancojn por Esperanto en lernejoj. La portalo de la projekto [lingvo.info](http://lingvo.info) kiun ni finis en 2016 daŭre funkcias kaj multaj homoj informiĝas pri lingvoj en ĝi. Ĝi estas atingebla ĉe <http://lingvo.info/eo/>

Maja Cimerman, Maja kaj Zlatko Tišljar ellaboris dum la jaro 6 projektojn por financado far EU por alvokoj por financado kadre de la programo Eŭropo por Civitanoj. El ili bedaŭrinde neniu sukcesis.

Okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj EEU dissendis inviton al la landaj asocioj prifesti ĝin kaj publikigi la aktivecojn. Ne multaj vere faris ion, tamen, ni ricevis dekon da informoj pri diversaj manifestaĵoj al tiu Tago dediĉitaĵ.



La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj assembleaj membroj partoprenis en kelkaj neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj kunsidoj diverstipaj. Aparte elstaris la laboro de Jozefo Reinart, Petro Balaž kaj Seán Ó Riain rilate mondajn konferencojn de poliglotoj

en Bratislavo kaj Ljubljana. J. Reinart partoprenis en konferenco pri subteno al vasta multlingveco, la 26an de aprilo en Slovakio. Li kaj Petro Balaž havis interparolon kun L. Miko, direktoro de Delegacio de Eŭropa Komisiono en Slovakio. Ili intertraktis helpon por organizo de Poliglota konferenco en Bratislavo kaj por Lingvo-fest. Flory Witdoeckt ĉeestis en organizo de Lingva Festivalo en Oostrende la 28-an de aprilo. Seán Ó Riain kaj Jozef Reinart prelegis en Poliglota renkontiĝo en Bratislavo la 30an de majo – 3-an de junio kaj Seán prelegis pri la irlanda lingvo, kaj la lernfaciligaj ecoj de Esperanto, ankaŭ en Ljubljana la



27-an de oktobro en Poliglota konferenco. Zlatko Tišljar partoprenis en la laboro de kunsidoj de partneroj en la projekto Multlingva Akcelilo en Zagrebo en januaro, kaj en Bratislavo en septembro.

Grandan aktivadon faris la prezidanto Seán Ó Riain havante la taskon daŭre teni kontaktojn kun la Komisionano de EU-Komisiono Vytenis Andriukaitis. Seán sukcesis konvinki V. Andriukaitis akcepti esti ĉefparolanto en la konferenco de EEU dediĉota al Rolo de Esperanto en rapidigo kaj plisukcesigo de lernado de fremdlingvoj en lernejoj en Triesto, kiu okazos en aŭgusto 2019 kaj kontakti alian komisionanon Navracsics por informi lin pri tiu sama konferenco kaj eventuale interesigi ankaŭ lin por partopreni.

### **Esperanto kiel parto de la nemateria kultura heredaĵo**

Aparte grava estas la kreskanta formala agnoskado de Esperanto kiel parto de la nemateria kultura heredaĵo fare de EU-landoj, kaj per tio ĉi-landoj formale agnoskas Esperanton kiel lingvon de kulturo, kaj tiel efike forigas unu el la plej fortaj argumentoj de la kontraŭuloj de Esperanto, ke „ĝi ne havas kulturon”. Pollando formale agnoskis Esperanton kiel parton de la nemateria kultura heredaĵo de Pollando kaj de Eŭropo en oktobro 2014. Kroatio same agnoskis ĝin februare 2019, pro la elstara agado de Spomenka Stimec. Julie 2018 EU-Komisionano Andriukaitis, stimulita fare de Seán Ó Riain, skribis al la Ĉefministro kaj la Ministro de Kulturo de Litovio por peti saman formalan agnoskon fare de Litovio, kaj Povilas Jegorovas laboras por atingi tiun celon. Jozef Reinvart, Petro Balaž kaj aliaj laboras sandirekte en Slovakio, kaj Ambasadoro Giorgio Novello kaj aliaj laboras tiucele en Italio.

### **Gravaj atingoj por Esperanto en Eŭropo en kiuj EEU ne rekte partoprenis**

Reta kurso learn.esperanto.com stimolata de EEU pligrandiĝis en 2018 je du pliaj lingvoj kaj nun oni povas rete lerni fundamenton de Esperanto en 24 lingvoj. Ni plu klopodas atingi ke ĝi ampleksu ĉiujn EU-lingvojn. Ĝin vizitas tage inter 400 kaj 500 personoj, do dum la tuta jaro ĉirkaŭ 20.000 personoj. La retportalon starigis en majo 2016 berlina esperantisto kaj komputilisto Georg Jaenig kaj plu prizorgas ĝin. Ĝia kvalito estas ke ĝi estas la plej rapida metodo por atingi parolbazon de Esperanto. En 2018 ĝin ekuzis ankaŭ la eksperimentaj kursoj en 3 elementaj lernejoj el Kroatio, Slovenio kaj Bulgario kiuj partoprenas en la EU-projekto Multlingva Akcelilo.

Seán Ó Riain kaj Ulrich Brandenburg partoprenis la 18-an de junio en diskuto kun Szabolcz Horvath, fakulo pri multlingveco kiun delegis komisionano Tibor Navracsics. La interparolo okazis en Bruselo.

Nun jam kvar-jara reta E-kurso kadre de granda portalo duolingo plu kolektas rekordojn. Krom la kurso en la angla kaj hispana, nun jam startis ankaŭ la kurso en la portugala lingvo kaj en ĉiu kreskas la lernantaro je dekmiloj. Oni devas konsideri la fakton ke la tuta konata statistiko de veraj kursoj kun instruistoj en la tuta mondo ne ampleksas pli ol 500 gelernantojn. Grava parto de tiu kursanaro estas en Eŭropo.

### **Enmovada Agado**

En 2018 la ĉefaj administraj devoj estis orgnizitaj kadre de la Lisbona UEA-kongreso, kie okazis du kunsidoj de la asembleo.

Okazis ĉefa asemblea kunsido kun la oficiala raporta tagordo. Ĉeestis 10 asembleanoj el 10 landaj asocioj el 18 kiuj pagis kotizojn. kio sufiĉis ke la asembleo plenrajte decidadis, Post la

raporto pri la agado en 2017, pri la financoj en 2017 kaj revizoro kaj ioma diskuto ĉiuj raportoj estis akceptitaj unuvoĉe. Ankaŭ laborplano por 2018 estis akceptita. Okazis la malferma asemblea kaj publika kunveno kun interesitaj kongresanoj de UEA kiu traktis la temon de perspektivoj por Esperanto en EU post Briteliro. La prezidanto parolis pri perspektivoj de EEU pere de la projekto Multlingva Akcelilo kaj pri aliaj aktivadoj de EEU. Okazis vigla debato pri tio.

Ulrich Brandenburg organizis kaj estris la Germanan E-Kongreson en Zweibrucken la 19-an de majo, kie Seán Ó Riain prelegis. Okaze de Zamenhoftago en solenaj prifestoj prelegis Seán Ó Riain en Vieno (Aŭstria festo, la 8-an de decembro), Zlatko Tišljár en Zagreb (Kroatio) kaj en Maribor (Slovenio) kaj Jozefo Reinvarť en Bratislavo (Slovakio). Zlatko Tišljár partoprenis ankaŭ en solena festo de 110-jariĝo de Kroatia E-Movado en Zagrebo en novembro.

La Eŭropa Bulteno regule aperis 11-foje (ĉiumonate krom en julio kaj aŭgusto kiam ĝi aperis kiel duobla numero). Ĉiu numero aperis je 12-18 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de EEU [www.europo.eu](http://www.europo.eu). Kopie ĝi aperas ankaŭ en la retejo de Remuŝ. European Bultenon redaktis Zlatko Tišljár.

La kunlaboro kun UEA estis bona: Ni interkonsentis pri la okazigo de niaj konferencoj kadre de UK en Lisbono kaj kunlaboris kadre de Eŭropa Komisiono de UEA.

La landa agado estis kontentiga. Ni invitis la landajn asociojn sed ankaŭ unuopulojn reagi al la enketo kiun dissendis eŭropa ombudsmano pri lingva demando en Eŭropo. Nia prezidanto prezentis konsilon kiel respondi al la enketo, kion multaj faris. Fine de la jaro aperis raporto de la Ombudsmano en kiu videblas ke entute respondis 286 asocioj kaj individuoj el kiuj 41 proponis kiel solvo ankaŭ Esperanton.

Ni ankaŭ invitis landajn asociojn soleni la Eŭropan Lingvan tagon la 26-an de septembro, kion kelkdeko da asocioj kaj urbaj socitoj faris. El ili menciindas, grava atingo de SKEF, kiu sukcesis organizi en Slovakio la unuan lingvan festivalon „LingvaFest 2018” la 28-29 septembro en Universitato de Ekonomio en Bratislavo kiu okazis sub aŭspicio de Martina Lubyová, Ministrino pri Edukado, Scienco, Esploro kaj Sporto de Slovakio. Jozef Reinvarť prelegis pri lingva politiko en EU kaj partoprenis en la paneldiskuto "Lingvoj en Eŭropa Unio: hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ". Petro Baláž, kunlaboranto de EEU estraro, prezidanto de SKEF, ĉeforganizanto de „LingvaFest” havis 3 diverstemajn prelegojn.

Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana Esperanto-Asocio, kiu plu administras salajron de nia direktorino Maja Tišljár.

La estraranoj regule kunlaboris kaj partoprenis en E-aranĝoj de landaj asocioj en siaj landoj: Zlatko Tišljár en Slovenio kaj Kroatio, Flory Witdoeckť en Belgio, Petro Baláž kaj Jozefo Reinvarť en Slovakio, Seán Ó Riain en Aŭstrio.

Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por 2017. Prizorgadon de la retpaĝaro plenumis Maja Tišljár. Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj, estis plene plenumita, kion prizorgis Maja Tišljár, Flory Witdoeckť kaj Zlatko Tišljár. La estraro ankaŭ preparis ampleksan laborplanon por 2019-a jaro kiu aperis en la novembro numero de EB.

## Financoj

La kotizpagado en 2018 estis sama kiel en antaŭa jaro: Pagis 10 asocioj. La jaro finance estis nebona, ĉar ni ricevis neniun novan projekton kaj kelkaj landaj asocioj plu evitas pagi.

Flory Witdoeckt ellaboris la financon raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2017 kaj por la asembleo en Lisbono. Ŝi daŭre librotenas la tutan financon laboron.

Zlatko Tišljarić, sekretario de EEU  
Februaro 2019.

## NI BEZONAS ESPERANTON EN EŬROPA UNIO

(Tio estas reago al teksto de Robert Nielsen “Ni ne bezonas esperantistan politikpartion”)

Kiu estas “ni” ? Unuope, ĉiu homo bezonas aeron por spiri, manĝon por nutri sin, domon por dormi trankvile, kaj eĉ eble amon por esti feliĉa. Esperantista politikpartio ne estas en tiu listo de nepraĵoj: unuope, ni ne bezonas tion. Ĉar la esperantista politikpartio estas Eŭropo-Demokratio-Esperanto, mi skribos nur pri ĝi. Ni memoru ke la ordo estas, laŭvice, unue Eŭropo (ĉefe la politika strukturo Eŭropa Unio), due Demokratio, trie (kaj fine) Esperanto.

### Eŭropa Unio estas multnacia imperio

Imperio ne estas tute taŭga vorto. La difinoj en PIV estas 1) granda regno bazita sur militforto 2) tuto de granda regno kun siaj kolonioj. Fakte Eŭropa Unio ne estas bazita sur militforto, kaj oficiale ĉiuj regnoj de EU estas egalaj, sed mi ne trovis pli taŭgan vorton.

EU ne estas ŝtato, nek federacia regno (federacio en PIV: “ekskluzive posedas la eksteran suverenecon”). Eble taŭgus la vorto konfederacio (laŭ PIV “asocio de civitoj aŭ regnoj, sendepende interne kaj en eksteraj rilatoj, sed kunigitaj por difinitaj komunaj celoj”).

Tamen Eŭropo similas al Rusio kiam tie naskiĝis Zamenhof. Ankaŭ similas al Aŭstrio-Hungario kiam Zamenhof studis oftalmologion en Vieno.

### Letero al Borovko por nuna tempo

Zamenhof skribis, pri sia naskiĝ-urbo Bialistoko: “Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj k.t.p.”

Hodiaŭ, ni povas skribi: Oni edukadas nin kiel Eŭropanojn; oni nin instruas ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume, ĉio ĉe ĉiu paŝo igas nin senti ke Eŭropanoj ne ekzistas: ekzistas sole Francoj, Poloj, Germanoj, Italoj k.t.p.

*Tempo pasas, sed problemoj restas.*

### Eŭropa Unio estas Aŭstrio-Hungario de la nuna tempo

Zamenhof studis ankaŭ en Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio-Hungario. Tiu regno estis multlingva: la ĉi-suba mapo montras almenaŭ dek. Estis multaj loĝantoj en tiu regno, kiu estis ekonomie sufiĉe forta. Multaj sciencistoj, artistoj kaj intelektuloj loĝis kaj laboris tie: Gregor Mendel, familio Strauss, Sigmund Freud...

Homaj rajtoj estis iel moderne konsiderataj. Ĉiuj scias ke la unua mondmilito eksplodis pro la

murdo de la heredonto de la imperiestro, kaj tio kaŭzis multajn milojn da mortoj; tamen la murdo ne estis kondamnita al morto, ĉar li estis laŭjure neplenaĝulo. Mi pensas ke se tiu afero estus okazinta en Francio, mortpuno estus aŭtomata.

Sed ĝi estis politike (kaj milite) malforta, pro tiu multlingveco. Kiam la soldatoj ne komprenas ordonojn de la militestroj, kaj ne kapablas raporti al ili, malfacila estas venko. Kiam homoj de iu regiono ne komprenas paroladojn de politikistoj de alia regiono, nebla estas demokratio je la tutlanda nivelo.



Mapo de lingvoj en Aŭstrio-Hungario

Tia estas la nuna Eŭropa Unio: kunigo de multaj landoj, granda, riĉa, sed malforta, ĉar tro multlingva.

### Opinioj de Eŭropanoj estas pli diversaj laŭ landoj (laŭ lingvoj?) ol laŭ sociaj grupoj

Eŭrobarometro estas nomo de esploroj pri publika opinio en Eŭropo (<http://ec.europa.eu/COMMFrontOffice/publicopinion/index.cfm>), pagataj de Eŭropa Unio (do de ĉiuj eŭropanoj). Mil homoj en ĉiu lando estas demandataj, el diversaj aĝoj, studniveloj, seksoj, profesioj, ktp., do preskaŭ 30 000 homoj estas demandataj en tuta Eŭropo. La lasta havebla (fino de januaro 2019) estas EB90<sup>1</sup>, de la fino de 2018. Interalie, demandoj

<sup>1</sup><http://ec.europa.eu/commfrontoffice/publicopinion/index.cfm/Survey/getSurveyDetail/instruments/STANDARD/surveyKy/2215>

estis “Kiuj estas la du ĉefaj problemoj kiujn Eŭropa Unio alfrontas nun?”. Oni povis elekti inter enmigrado, terorigado, publika financo, ekonomio, klimato, senlaboro, influo de EU en la mondo, inflacio, medio, malsekuro, pensioj, energio, impostoj.

La respondoj estis tre malsimilaj. Por pli bone vidigi la rezulton, mi uzis statistikan metodon “analizo de respondoj”, per softvaro PAST<sup>2</sup>. Loĝantoj de nordaj kaj okcidentaj landoj (Svedio, Finnlando, Nederlando, Danlando, Germanio, Belgio) ĉefe zorgas pri klimato, medio, influo de EU en la mondo, publika financo kaj energio). Loĝantoj de sudaj landoj (Italio, Hispanio, Grekio, Kipro) maltrankviliĝas pro senlaboro, impostoj, ekonomio, pensio. Aro da orientaj landoj (Ĉeĥio, Bulgario, Estonio, Hungario, Slovakio, Pollando, Kroatio, Litovio, Latvio), kaj Malto, ĉefe pensas pri terorigado, enmigrado, malsekuro.

Mi same faris kun la antaŭa raporto EB89 (komenco de 2018), kaj la rezulto estis simila. En tiu malpli nova esploro, ankaŭ haveblas datumoj pri sociaj grupoj (aĝo, sekso, enspezo, studnivelo...): oni povas vidi ke la opinioj pri tiuj temoj estas pli diversaj laŭ la landoj ol laŭ la sociaj grupoj.

Kiel rezone politikumi en Eŭropo, se la plimulto de loĝantoj ne povas kompreni viajn argumentojn?

### «Flavaj veŝtoj» ĉefe aktivas en francparolantaj landoj

De novembro 2018 ĝis hodiaŭ (februaro 2019), ĉiusabate, homoj kun flavaj veŝtoj manifestacias en francaj urboj, por diri sian malkontenton pri la registaro. Tio estas ne nur en kontinenta Francio sed ankaŭ en la transmaraj regionoj. Dum la fino de novembro, ankaŭ manifestaciis flavuloj en Belgio, sed nur en la franc-parolanta regiono<sup>3</sup>. Ni povas pensi ke informoj kaj opinioj rapide trairis la ŝtatajn limojn, sed ne sukcesis trairi la lingvan limon en Belgio.

*Komuna lingvo necesas por rapide interŝangi informojn kaj opiniojn, kaj poste havi komunan sintenon, prave aŭ malprave.*

### Konstitucia kortumo de Germanio kaj simplaj civitanoj diras ke Eŭropa Unio ne estas demokrata strukturo

Laŭ la konstitucia kortumo de Germanio la Eŭropa parlamento ne estas vera parlamento kaj Eŭropa unio ne estas demokrata strukturo. En majo 2019 estos baloto por elekti deputitojn al la Eŭropa Parlamento. Regulo valida por la tuta Eŭropa Unio diras ke tiu baloto estu nacia, proporcia, eble en regionaj distriktoj, kaj kun maksimuma elektosoĵlo de 5 procentoj. Elektosoĵlo estas kutima en balotoj por nacia parlamento: tiel la malgrandaj partioj ne povas havi deputitojn, tio favoras grandajn partiojn, do instigas al kuniĝo de partioj por estigi grandajn partiojn. En Germanio estas elektosoĵlo de 5% por la germana parlamento. Pro tio, antaŭ multaj jaroj, la germana registaro decidis ke estos tiu elektosoĵlo ankaŭ en la eŭropa baloto. Tamen, en Germanio, iuj plendis ke elektosoĵlo forigas malgrandajn partiojn, kaj ke tio estas maljusta. La plendoj iris ĝis la supera kortumo de Germanio, konstitucia kortumo. En 2009 tiu kortumo decidis ke la germana registaro malpravus kaj ke ne estu elektosoĵlo en eŭropa baloto<sup>4</sup>. La motivo estas ke “Eŭropa parlamento ne estas reprezentilo de suverena

<sup>2</sup><https://folk.uio.no/ohammer/past/>

<sup>3</sup>[https://www.lemonde.fr/m-le-mag/article/2018/11/30/les-gilets-jaunes-divisent-la-belgique\\_5390875\\_4500055.html](https://www.lemonde.fr/m-le-mag/article/2018/11/30/les-gilets-jaunes-divisent-la-belgique_5390875_4500055.html)

<sup>4</sup>en la germana:

[https://www.bundesverfassungsgericht.de/SharedDocs/Entscheidungen/DE/2009/06/es20090630\\_2bve000208.html](https://www.bundesverfassungsgericht.de/SharedDocs/Entscheidungen/DE/2009/06/es20090630_2bve000208.html) ; en la franca:

[https://www.bundesverfassungsgericht.de/SharedDocs/Entscheidungen/FR/2009/06/es20090630\\_2bve000208fr.html](https://www.bundesverfassungsgericht.de/SharedDocs/Entscheidungen/FR/2009/06/es20090630_2bve000208fr.html) ; en la angla:

[https://www.bundesverfassungsgericht.de/SharedDocs/Entscheidungen/EN/2009/06/es20090630\\_2bve000208en.html](https://www.bundesverfassungsgericht.de/SharedDocs/Entscheidungen/EN/2009/06/es20090630_2bve000208en.html)

eŭropa popolo. La Eŭropa Parlamento estas organizita laŭ modelo de reprezento de popoloj, sed ne laŭ modelo de reprezento de ĉiuj civitanoj de la EU, kiel unu grupo.”

*La plej alta kortumo de la plej loĝata lando de Eŭropa Unio diras ke Eŭropa Unio ne estas demokrata strukturo. Ankaŭ Eŭropo-Demokratio-Esperanto diras tion, eĉ se la motivoj estas malsimilaj.*

### **Eŭropanoj pensas ke demokratio pli bone funkcias en ilia lando ol en Eŭropa Unio**

En la enketo Eŭrobarometro 89 (la lasta havebla en januaro 2019 kun ĉiuj demandoj kaj respondoj), homoj estis demandataj “Ĉu vi kontentas pri demokratio en via lando?” kaj “Ĉu vi kontentas pri demokratio en Eŭropa Unio?”. 57 % diras “mi kontentas pri demokratio en mia lando”, sed nur 49 % diras “mi kontentas pri demokratio en Eŭropa Unio”

*Tio ne estas hazarda rezulto: ankaŭ la aliaj esploroj de Eŭrobarometro montras same ke Eŭropanoj pensas ke demokratio pli bone funkcias en la lando ol en Eŭropo.*

### **Tamen eŭropanoj deziras pli da egaleco kaj pli da justeco pri lingvoj.**

Antaŭ jaroj estis enketoj de Eŭrobarometro kiuj demandis al eŭropanoj iliajn konojn kaj dezirojn pri lingvoj. La lasta enketo Eŭrobarometra pri lingvoj estas EB386<sup>5</sup>, de la komenco de 2012. La antaŭa estas EB243 (fino 2005, komenco 2006). Antaŭe estis EB55 (2001) en kiu ankaŭ temis pri lingvoj. Datumoj de tiuj enketoj: 2001, 2005, 2012, do intertempoj estas 4 jaroj kaj 7 jaroj. Ni estas en 2019, 7 jaroj poste, kaj estas neniu nova esploro “Eŭrobarometro” pri lingvoj. Kial?

Eŭropanoj deziras ke ĉiuj en EU scipovu komunan lingvon

Pli ol du trionoj de Eŭropanoj deziras komunan lingvon. Eŭropanoj deziras ke ĉiuj lingvoj estu same traktataj. Granda nombro (pli ol kvar kvinonaj) deziras ke ĉiuj lingvoj estu same traktataj. “La Eŭropanoj ĝenerale deziras ke ĉiuj en EU kapablu paroli komunan lingvon (69%), kaj eta plimulto el ili pensas ke la eŭropaj institucioj devus elekti ununuran lingvon por komuniki kun eŭropaj civitanoj (53%) ; ili pensas samtempe ke ĉiuj lingvoj en la EU devus esti traktataj sammaniere. Tiu aserto, kiu estas menciita de 81 % de la respondintoj, estas hodiaŭ pli forta ol en 2005.” Tio ne estas mia aserto, tio estas la konkludo de la oficiala raporto EB386.

La lisbona traktado, kiu estas oficiale la bazo de Eŭropa Unio, indikas en ĝia artikolo 2 “la Unio estas fondita sur valoroj de demokrateco, de egaleco, de respekto de rajtoj de malplimulto... en socio de plurismo, de ne-diskriminacio”, ktp... do la regantoj devus konsenti tiun deziron. Tiuj du deziroj ŝajnas kontraŭaj. Se oni prenas nacian lingvon kiel komunan lingvon por la tuta Eŭropa Unio, aperas malekvilibro (diskriminacio?) inter eŭropaj popoloj: la denaskaj parolantoj de tiu lingvo estos favorataj rilate al la parolantoj de aliaj lingvoj. Se oni same traktas ĉiujn lingvojn, oni ne povas favori iun el ili por esti komuna lingvo.

Konkludo: nur disvolviĝo de Esperanto povas solvi la kontraŭon, kaj ebligi progreson de Eŭropa Unio. La internacia lingvo Esperanto estas konceptita specife por tiu celo: justa komunikado inter homoj de malsamaj familiaj lingvoj. Ĝi estas justa, ĉar ĝi ne estas propraĵo de iu eŭropa gento: neniu estas favorata nek malfavorata.

Ĝi estas pli facila ol la tradiciaj lingvoj. Ĝia lernado ne malebligas lerni aliajn lingvojn. Male, lerni esperanton plifaciligas la postan lernadon de aliaj lingvoj. Ĝi estas pli preciza ol multaj tradiciaj lingvoj. La gramatika strukturo de la frazoj malebligas multajn erarojn de kompreno, ĉefe kiam necesas pluraj tradukoj sinsekve, uzante iun lingvon kiel pontolingvon inter du lingvoj malmulte uzataj.

<sup>5</sup>en la franca: <http://ec.europa.eu/commfrontoffice/publicopinion/archives/ebs/> ĝin en la germana)

Ni, unuope, ne bezonas esperantistan politikpartion. Niaj landoj, unuope, ne bezonas esperantistan politikpartion. Sed Eŭropa Unio bezonas esperanton, por esti tia kia ĝi estas priskribita: demokrata strukturo supernacia. Pro tio Ekzistas EDE – Eŭropo – Demokratio – Esperanto.

Statikajn tabelojn vidu ĉi tie <http://www.e-d-e.org/europoblogo/index.php?article10/jes-e-ropa-unio-bezonas-esperanton>

Pierre Dieumegard

## **INVITO AL ASEMBLEANOJ DE EEU ĈEESTI EN LA ASEMBLEAJ KUNSIDOJ EN TRIESTO**

Kiel jam ni informadis, la oficialaj kunsidoj de la asembleo okazos ĉi-jare en Triesto, Italio. Ni invitas la asembleanojn partopreni ĉar tio estas devo de ni ĉiuj laŭ la statuto kaj leĝoj de Belgio.

La programo de EEU en Triesto okazos laŭ jena plano:

Dimanĉon la 25an de aŭgusto 2019

9.30 inaŭguro de la Kongreso kun parolado de eŭropa komisionano Andriukaitis

14.30 kunsido de la estraro de EEU kun eŭropa komisionano Andriukaitis

16.00 prelegoj de Seán Ó Riain kaj Zlatko Tišljár

Lundon, la 26an de aŭgusto 2019


9.00 – 12.00 malferma kunsido de EEU (kun aliaj kongresanoj)

15.00 prelegoj de Jozef Reinvart kaj Tim Morley

17.15 fermita asemblea kunsido de EEU kun oficialaj tagordaj punktoj (pri tio la asemblasanoj ricevos aparte la inviton.

Zlatko Tišljár

## OSCAR-PREMIO AL FILM-ENTREPRENO ESPERANTO-FILMOJ



La filmo Roma ricevis tri Oskar-premiojn. Mi jam vidis ĝin kaj ĝi estas belega. Mi plene rekomendas ĝin. Kiel propagandilo ni povas fanfaroni inter konatuloj ke la produktora entrepreno estas Esperanto-filmoj, kaj tio aperas en la unua kaj lasta kadro de la filmo. Krome la filmo, kiu en la jaro 2017 gajnis Oskar-premion por la plej bona aktoro, Kapitano Fantastic de Vigo Mortensen, estas filmo kun grava rolo de Esperanto en la intrigo.

José María Salguero - Kani

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 28-an de februaro 2019

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Enrico Gaetano Borrello, Tonio del Barrio, Pierre Dieumegard, José María Salguero, Zlatko Tišljár

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

